

Kubo kaj Usono restarigis siajn diplomatiajn rilatojn.



La 1-an de julio 2015, la prezidento de Kubo, Raúl Castro kaj la prezidento de Usono, Barack Obama, interŝanĝis leterojn per kiuj ili konfirmis la decidon restarigi la diplomatiajn rilatojn inter la du landoj kaj malfermi la ambasadejojn en la respektivaj ŝtatoj ekde la 20-a de julio.

Per tiu ŝanĝo Kubo kaj Usono konfirmis la intencon evoluigi rilatojn respektemajn kaj kunlaborajn surbaze de la principoj kaj celoj konsekritaj en la ĉarto de UN kaj la Internacia Juro, specife pri la konvencioj de Vieno pri diplomatiaj kaj konsulaj rilatoj.

Siaflanke la kuba registaro publikigis oficialan anoncon kiu sciigas ke tiu ŝanĝo obeas al la plena efektivigo de la insula suvereneco ligita al la idealoj de sendependeco kaj socia justeco, solidareco al la justaj kaŭzoj kaj konfirmo de la principoj kiuj markis la vivon de la insulo gvidite de la historia gvidanto de la revolucio, Fidel Castro.

Kun tiu ŝanĝo finiĝas la unua etapo de longa kaj kompleksa procezo al la normaligo de la reciprokaj rilatoj kiu bezonas ŝesigi la ekonomian sieĝon altrudatan al la insulo, kiu konsistigas la ĉefan obstaklon al la evoluo de la landa ekonomio kaj estas perforto de la internacia juro. Ŝanĝo damaĝas la insulan popolon kaj ankaŭ la interesojn de ĉiuj landoj.

La kuba registaro anka? rekonfirmis sian pretecon subteni respektaman dialogon kun la usona registaro kaj evoluigi rilatojn de civilizita kunvivado, surbaze de respekto al la diferencoj inter amba? registaroj kaj en la kunlaboro pri temoj de reciproka bonfaro.

Dume, Kubo da?rigos sian laboron en la procezo aktualigi sian ekonomian kaj socian modelon por konstrui socialismon prosperan kaj da?rigeblan, avanci en la landa evoluo kaj solidigi la atingojn de la Revolucio.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/61120-kubo-kaj-usono-restarigis-siajn-diplomatiajn-rilatojn>



Radio Habana Cuba